

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 47-a BRAZILO, JANUARO-FEBRUARO-MARDO 2023 N-ro 189

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
Zamenhof. *La Espero*.

ĈU NI ESTAS KRUELAJ?

Paulo Sérgio Viana

NE MALOFTE ONI RICEVAS informojn pri kruelaĵoj en la mondo, kiujn homoj praktikas kontraŭ aliaj homoj. En militoj, en sociaj konfliktoj, en sinteno de aŭtoritatuloj koncerne al civitanoj en situacioj de forlasiteco, en la rilatoj de familianoj kun siaj maljunuloj, en la simpla kaj tragika ekzisto de mizero kaj malsato — ankoraŭ regas en nia mondo impresa indiferenteco pri la homa sufero. La plej multaj loĝantoj de la Tero ankoraŭ vivas kvazaŭ la doloroj de iliaj proksimuloj tute ne tuŝus ilin.

En Brazilo, milionoj malsatas, dum la eksportado de nutraĵoj al aliaj landoj atingas grandegajn ciferojn (kaj mongajnon); miloj da murdoj okazas ĉiutage, precipe post la faciligo de aĉetado de pafiloj; milionoj da familioj vivas surstrate, en grandaj urboj, ĉar ili ne povas havigi al si dignan loĝejon; unu miliono da infanoj ankoraŭ restas ekster lerneja edukado. La listo estas pli longa, sed ne indas emfazi tiajn malbelaĵojn: ni ĉiuj konscias pri tiaj kruelaĵoj.

Kio estas fakte “kruelaĵo”?

Ĝi estas io pli malbela ol simpla “detruemo”. Kruela ago estas tia, ke la aganto tute ne kapablas percepti la doloron de alia estulo, kiam ĉi tiu ricevas agreson, baton, turmenton, doloron. Temas pri absoluta indiferenteco. En pli severaj okazoj, kruela persono eĉ sentas plezuron kaŭzi kaj observi aliulan suferon. Tiam oni nomas ĝin sadismo.

Bedaŭrinde, en nia mondo ankoraŭ troviĝas tro multe da kruleco. Tamen, se ni pensas pri tiu terura socia kaj individua spirita malsano, ne indas akuzi, sed rigardi al si mem. Ĉu mi mem ankoraŭ gardas en mi tendencon al kruleco? Ĉu mi

vigle batalas kontraŭ ĝi en mi mem, en la ĉiutaga vivo? Ĉiu homo sur la Tero havas la taskon batali kontraŭ kruleco — sia kaj aliula.

En *La Libro de la Spiritoj*, Allan Kardec atentis pri tiu trajto de la homaro. Li demandis la Spiritojn:

“754. Ĉu kruleco ne estas kaŭzata de manko de morala sento?”

La respondo estas tre interesa kaj pensiga:

“Diru, prefere, ke morala sento ankoraŭ ne elvolviĝis; sed ne diru, ke ĝi mankas, ĉar ties principo ekzistas ĉe ĉiuj homoj kaj estas tio, kio ilin poste faras bonaj kaj humanaj estuloj. Morala sento ekzistas do ĉe sovaĝulo, sed ĝi troviĝas en li, kiel la parfumoprincipo en florĝermo, antaŭ ol floro disvolviĝos.”

Ĉi tiu respondo starigas en la koro de prudenta homo grandan esperon kaj instigon. Ĝi signifas, ke la mondo ne estas “destinita” al kruleco. Male, ke ĉi tiu ombra spirita situacio en la mondo estas nur momento en la nepra evoluo de la homaro. Ni ja venkos tiun malindan trajton de niaj spiritoj. Sed por tio, implice troviĝas la rekomendo, ke ni serioze entreprenu “konstruadon” de pli bona, homeca mondo. Komence en ni mem, per konstanta vigla gardado de niaj animoj kontraŭ niaj malsuperaj tendencoj al kruleco — restaĵo de la tempo, kiam ni estis “sovaĝuloj”. Ni havas la devon forviŝi de ni mem ĉian trajton de sovaĝeco, kiu eventuale ankoraŭ makulas nian spiriton.

Jen konstruado por la tuta vivo.

“En socio organizita laŭ la leĝo de la Kristo, neniu devas pereji de malsato.” (demando 930)



NE MIRU!

Espírito Abel Gomes

Ne miru, frato ke mi ion
Ellernis en la viv' astrala;
Postmorte povas la spirito
Progresi en la sci' reala.

Surtere el semet' malgranda
Eĉ alta arbo kreski povas;
Animo ĉiu en ĉi mondo
Pliperfektigi eblon trovas.

Dependas ĉio de la volo
Kaj de l' altec' de l' idealo;
L' animo povas progresadi
Sur mont', sur eben', en valo.

Se, tamen, ĝi ne volas lerni,
Neniu lerni ĝin devigos.
Libera estas ja l' animo,
Nur ĝia propra vol' ĝin ligos.

La propra vol' al ago ligas,
Per ag' atingas ĝi la celon;
Volita ago naskas ĝojon
Kiele la Abel' mielon.

Mediumo: Francisco Valdomiro Lorenz
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto
Reformador (FEB), Jun 1946.

NUR PRIPENSANTE

Aymoré Vaz Pinto

NI VOLAS MARŜI kunlaborante al progreso cele al plibona estonta mondo, sed ni komprenas ke tio ne eblas se ni ne plenumas nian nunan devon.

Estas agrable rigardi la ĉielon kaj admiri stelojn, sed sen forgesi la kampon de ĉiutaga batalado.

La vegetalo disvolviĝas sin alten turnante al la sunlumo, tamen konservante siajn radikojn intime en la grundo, por ne defali ĉe la unuaj tempestoj.

La Naturo instruas nin alten direkti nian menson, tenante la piedojn sur la grundo, flank-ĉe-flanke kun la fratoj kiuj bezonas nian apogon.

Ni ankoraŭ profitu la ekzemplon de la vegetalo: ĝi produktas laŭ la celoj difinitaj en sia semo. Kvankam ĝi ne havas inteligentecon, ĝi tamen

ĉiam plenumas la celojn difinitajn en siaj semoj. La homoj havas inteligentecon sed ne ĉiam plenumas siajn celojn.

Kiu estas la homa celo? Se li vivas en suferiga medio li devas mildigi la suferon; se en senscia medio li devas kunporti instruon; se en malpaca medio li devas kunporti la pacon, la fratecon, kiel faris Zamenhof, kiu kunportis Esperanton, ilon de paco kaj frateco. Li, Zamenhof, plenumis sian celon.



KOMUNIKOJ | Jaro 47-a
| n-ro 189 | Januaro-Februaro-Mardo | 2023
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ
Fondita la 15-an de Decembro 1975
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
☎ +55-21-98427-8080
Librovendejo: editoralorenz.com.br
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Fejsbuko: Editora Lorenz

| Kompostita de Rogério Mota |



Kuriozaĵoj el la Leteroj de Zamenhof

AL LA NOVA JARO.

("La esperantisto" n-ro 1, p. 1; ov. 11-34)

Al ĉiuj niaj amikoj en diversaj landoj kaj urboj ni sendas per ĉi nian koran gratulon je la veninta nova jaro. Ni esperu, ke tiu ĉi jaro alportos al nia afero grandan forton kaj proksimigos ĝin per paŝoj grandegaj al la ideala celo. Se ni ekmemoros, en kia malfavora tempo naskiĝis nia afero kaj kun kiuj grandegaj malfacilaĵoj ĝi devis batali en siaj unuaj kelkaj jaroj de ekzistado, se ni vidas, ke malgraŭ ĉio la afero ĉion kuraĝe eltenis kaj stariĝis fine sur fortaj piedoj, Sur vojo promesanta nun regulan progresadon, - ni povas diri, ke ni havas la rajton kuraĝe kaj kun la plej bonaj espero rigardi en la estontecon.

Pri nia programo en la nuna jaro ni ne bezonas paroli, ĉar la legantoj ĝin jam scias. Ni diros nur, ke ni irados konstante laŭ la vojo, kiun ni unu fojon elektis, kaj nenia forto igos nin fariĝi malfidela al la afero, el kiu ni faris la celon de nia vivo. La graveco de nia afero estas nia fera ŝildo, kaj laborado, konstanteco kaj pacienco, pacienco, konstanteco kaj laborado, konstanteco, laborado kaj pacienco estas la fortoj, per kiuj ni devas venki, se eĉ granda parto de la nun disŝutata semo ŝajnas perdata. Al diversaj personoj, al kiuj nia celo ŝajnas neatingebla, ni povas diri, ke nenio en la mondo estas neatingebla por kolekto da personoj, kiuj, konsciante la tutan gravecon de sia afero, decidis malgraŭ ĉiuj cirkonstancoj neniam ripozi, ĝis ili venos al la celo.

La amikojn de nia afero ni invitas al eble plej frua abonado de nia organo kaj ni petas ilin zorgi pri ĉiam novaj abonantoj. Ni revokas en la memoron de niaj amikoj, ke de la stato de nia organo dependas la stato de nia afero. Plenumante la peton de kelkaj abonantoj, ni decidis akceptadi ankaŭ abonon por 1/2 jaro (de Januaro ĝis Julio kaj de Julio ĝis Januaro); sed kiu povas, tiu faros pli bone, se li abonos per unu fojo por tuta jaro.

La malhelpoj, kiuj en la lasta tempo kaŭzis nereglecon en la elirado de la numeroj, nun estas jam forigitaj. Se iu el la abonantoj ricevos la gazeton neakurate, ni petas lin skribi al ni pri tio ĉi, por ke ni povu rebonigi tiun ĉi neakuratecon. Nia gazeto elirados nun regule unu fojon en la monato kaj ĝia grandeco komencante de la nuna numero estos duobla, t.e., ĉiu numero enhavos 8 paĝojn.

Zamenhof



Carlos, Lezier (edzino) kaj du filoj.

MIAJ FILOJ KAJ MI

Carlos de Abreu

Miaj filoj kaj mi estas filoj de Di'.

Kiam la suno bruligas la taglumon,
Ĝi radias belon kaj koloron,
Kaj pli forte bluigas la ĉielon.

Miaj filoj kaj mi estas filoj de Di'.

Kiam mi fikse rigardas la okulojn de miaj filoj,
Mi sentas vian ĉeeston, mia Sinjoro.

Kaj mi preĝe vin dankas
La okazon esti ĉi tie.

Miaj filoj kaj mi estas filoj de Di'.

Kiam mi rigardas al la ĉielo,
Mi sentas, ke Dia Forto nin regas.

Kaj tiu forto estas Jesuo.


Miaj filoj kaj mi estas filoj de Di'.

Tradukis el la portugala: Affonso Soares



Jam disponeblas nia
NOVA RETEJO

www.editoralorenz.com.br



SKANU QR-KODON
PER VIA POŝTELEFONO



LA PORDO

Anibal Machado

ESTIS STRANGE kiel mi sentis min, neatendite, translokigita al la regno de la morto.

Kiam mi pensadis pri la grava momento, terurite, eble kaŭze de la mistero, kiu kaŝus sin post la vivo, venadis, ĉiam, al la memoro, la dolĉaj imagoj de mia infaneco, kiam mi sonĝis pri la flugantaj anĝeloj, kiuj trakuris la ĉielan pejzaĝon, ornamante per steloj la noktojn plenajn de lunlumo.

Foje, kiam mi direktadis la rigardon al mia interno en la ekzameno de mia konscienco se mi ne vidis florajn vojojn, tamen starigis multaj dornoj en la flankoj, kaj multaj ŝtonoj sangigis miajn piedojn. Kaj inter la vidaĵo de la anĝeloj de la knabeco kaj la malglata vojo de la longa vivo, mi sentis min arestita en la angoro de la fino de miaj tagoj.

Konfuzis mian spiriton la dubo pri la nekonato.

Kio estus la morto? Abismo inter la nenio kaj la vivo? Nokto sen matenruĝo? Aŭ – kiu scias? – la ombra eniro en strangan mondon kun strangaj travivaĵoj – unu enirejo al la eterneco, sen perspektivoj nek gloroj? Fine, kiom valorus la vivo?

La malvenkoj kaj venkoj en la mondo de la homoj por kio taŭgus se la mondo de la mortintoj estus la fatala destino de la kreitoj?

La riĉecoj de la spirito, la beletraj verkoj, la akademioj, kiuj senmortigis la nomojn en la forkurema memoro de malmultaj homoj – por kio utilis ĉiuj tiuj vantaĵoj?

Pasis la horoj kaj minutoj, forfluis la vivo en la sablohorloĝo, kvazaŭ sablo eliĝanta, sekundo post sekundo, kunigante, per ora fadeno, la tempon kiu iras kun la tempo kiu venas. Mia rigardo nebuligita de la jaroj, laca de la lumo, jam ne spegulis la ĝojojn de la animo nek la anksiecojn de la korpo. Estis kvazaŭ lumturo perdita en nebula nokto.

La laca korpo fordoniĝis al la eldetruigo de la ĉeloj. Jam ne brilis la inteligento de la verkisto nek fulmobrilis la rimoj de la poeto. La pezo de miaj palpebroj donis al mi senton similan al estingo de la lumo, kvazaŭ la fermo de kurtenoj en la ĉambregoj de la Akademio.

Mi dronis, fine, en la dormon, kunportante la angoron de la morto kaj la anksiecon de la mistero.

En la silento, mi perdis la sencon de ĉio. Estis kvazaŭ la jarcentoj neproduktemaj en sia vojo estus pasintaj sur mia korpo kaj mia spirito – dum restaĵo de konscio, foje, igis min percepti, kiel okazas dum katalepsia fenomeno, ke la mondo, ĉirkaŭe, ankoraŭ ekzistas.

Iom post iom, kiel iu, kiu revigliĝas por la vivo, mi rekonsciigis, ke ankoraŭ mi ekzistas. Mi perceptis, ke mi estas viva!

Do, ĉio estis premsongoj!

Ne, la morto ne ekzistas! La homo estas nemortema, li havas eternajn travivaĵojn dum la sekvo de la tempo, renovigante ĉiam, liberigante, en ĉiu etapo, el la katenoj de la morto, kiu lin arestas en la regionoj de la materio.

Mi denove pensis pri la imagoj de mia infaneco kaj vidis ke, vere, post la vivo estas ne la nokto, sed vastegaj lumaj vojoj, plenaj de nova homaro, kiu ilin trakuras ridetante kaj feliĉa, kiel grupoj de anĝeloj serĉante la Sinjoron. La morto estas la pordo, kiu malfermiĝas por la vivo!



ANIBAL MACHADO (1894-1964) verkis romanojn, novelojn, kronikojn kaj teatraĵojn kaj ankaŭ faris recenziĝojn pri plastikaj artoj. Li naskiĝis en Sabará (ŝtato Minas Gerais) kaj estis prezidanto de la Brazila Kongreso de Verkistoj.

Mediumo: Heitor Luz Filho

Tradukis el la portugala: Djalma de Souza Lima

MONDO, ENORMA KORTO

Abel Sidney

Jam nenion ni timas!

Kun apertaj okuloj,
Ni aŭdace alfrontis ajnan timon.

Mi asertas al vi, ke la mondo malgrandiĝis.

Ni rompjis la barojn...

Ni armis nin per espero
Kaj sentime rigardis la futuron.

En la fundo, kie staris barilo,
Ni konstruis grandan kabanon kun verando.

Tie ni metis, sur improvizitan
Tablon, niajn oferojn.

Post la disbato de l' muroj,
Homoj venis de malproksime.

Unuj kunportis *pupunja*¹ kaj forportis
Pasiflorŝaŭmon, kuiritan de mia patrino.

Aliaj pendigis bananfaskojn,
(kiel en olda tempo) forportis nenion,
Sed postlasis dankleteretojn
Pro la oferto de restado
Kaj manĝo.

...
Iun tagon mi renkontis ŝin,
Malpeze paŝanta, sen masko...

De kiom da tempo mi ne vidis
les nazon, buŝon, rideton?

Tio igis min plori, ravita...

Ŝi, tiel bela... Ene ni restis,
Kune, kvarantene, sur hamako
Teksita de mia patro.

Ni ne malsaniĝis. La viruson ni rezistis,
Kaj ni geedziĝis en bela ceremonio,
Kiun ĉiuj spektis de malproksime...

Ni plantis bazilion kaj cikorion
En vasta grenejo, kiun ni fikse starigis
Tute apud la posta muro.

Pakaoj, tatuoj kaj agutioj ĉiam
Venas viziti nin.

Unu tagon, s-rino Rozo, la akuŝistino,
Surprizis nin per vizito.

En sonĝo ŝi vidis, ke
Knabeto enflugis
Tra nia fenestro.

Ne malfruis la naŭzoj.

Fortaj infanoj tiam naskiĝis
Liberaj je ĉia malhelpo.

Tio estis la denask-sanaj.

Estis ili, kiuj, liberaj,
Travojaĝus la mondon...

Multaj, tre junaj, jam kunportis
Sanon kaj saĝon.

Mia filo certe venis ŝarĝita
Per genetikaj indikiloj de renovigo.

Li naskiĝis forta kaj ni tuj malkovris:
Ĉiuj birdoj venis lin karesi...

Ni sciis, ke tre frue li
Nepre forflugos.

Venus la malpli junaj
Kaj kiam eksonus la horo
Li mem sciis.

Ĝuste en tiu tempo komenciĝis
La ĉeso de ĉia formo de violento.

Ni nepre devus konfidi unuj aliajn.

Niaj infanoj trakuris la mondon,
Dissemante sur teroj ne ĉirkaŭitaj,
En vastega korto, la ĝojon,
Kiu resanigas kaj la saĝon,
Kiu ĉion restarigas!

Tradukis el la portugala: Affonso soares

¹ Palmo (portugale *pupunha*), kies medolo kaj frukto estas kulinare uzataj.

KATOLIKAJ ESPERANTISTAJ PASTROJ

Eurípedes Alves Barbosa

NUNTEMPE MI ne konas katolikajn pastrojn en nia brazila Esperanto-movado. Mi certas, ke Esperanto malaperis el la brazila katolika eklezio.

En pasintaj jaroj, pluraj sacerdotoj agadis favore al nia lingvo, instruante, verkante, prelegante, ktp.

Mi omaĝas tri sacerdotojn, kiuj estis fervoraj esperantistoj. Jen ili.

ADAUTO SOARES MONTEIRO, S.J.

Pastro Adauto Soares Monteiro naskiĝis la 22-an de septembro 1911, en Santa Luzia de Carangola, ŝtato Minas Gerais. Kiam li estis knabo, lia familio translokiĝis al Rio de Janeiro.

Li estis civila kaj kemia inĝeniero, diplomita en la Politeknika Lernejo de la Brazila Universitato. Li estis ankaŭ talenta matematikisto.

En la jaro 1936, li forlasis sian profesion okupon kaj eniris en la Kompanion de Jesuo. Dum lia novicado, Adaŭkto studadis la latinan kaj grekan literaturojn kaj filozofion.

En 1945, en São Leopoldo, Rio Grande do Sul, li komencis sian teologian kurson. Poste, pastro Soares forlasis la urbon São Leopoldo por daurigi sian teologian kurson en la Teologia Jezuita Fakultato, en Buenos Aires, Argentino. Tiam, flanke de la teologia studado, li konatiĝis kun Esperanto, tuj fariĝante ne nur fervora samideano, sed ankaŭ sperta kaj eleganta esperanta verkisto.

Laŭ noto aperinta en la Montara Bulteno, n-ro 3/6, pastro Soares estis aktiva, laborema, humila kaj bonkora homo.

BENEDITO MARINHO

La abato Benedito Marinho, tre fervora esperantisto, talenta oratoro, partoprenis la solenan malfermon de la 1-a Brazila Kongreso de Esperanto, Rio de Janeiro-

RJ, de la 12-a ĝis la 21-a de julio 1907. Li reprezentis la kardinalon Arcoverde.

Li mortis en Rio de Janeiro la 9-an de oktobro 1966. Brazila Esperantisto anoncis lian morton en la numero de majo/aŭgusto 1966, informante, ke monsinjoro Benedito Marinho estis fama katolika oratoro kaj ke li faris brilan salutan predikon dum meso okazinta en la 6-a Brazila Kongreso de Esperanto.

En la 3-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Petrópolis-RJ, 13-15 de majo 1910, Benedito Marinho predikis pri "Esperanto kaj Katolika Eklezio" ĉe la Ĉefpreĝejo de Petrópolis.

Pastro Marinho ĉeestis ankaŭ en la 4-a Brazila Kongreso, en Juiz de Fora, Minas Gerais, aprilo 1911, kiam li faris belegan predikon.

BERNARDINO CARVALHO



Ismael Gomes Braga, en letero sendita al Ernesth Green Dodge (23/05/1943), informas: "Nun eniris en nia movadon tre rimarkinda pastro, nome Pastro Bernardino Carvalho, Altinho, Pernambuco. Mi multon esperas de li. Li estas juna kaj tre agema homo."

Pastro Bernardino instruis Esperanton en Grupo Esperantista Odilon de Araújo, en la urbo Altinho, ŝtato Pernambuco.

Li publikigis tre interesan artikolon en la gazeto Pernambuco Esperantisto (aŭgusto 1942), titolitan "Kiel mi konis Esperanton." Jen parto de la teksto:

"Antaŭ pli ol dek kvin tagoj, mi havis la feliĉon koni Esperanton. Feliĉega okazo ebligis al mi la unuan kontakton kun fervora esperantisto. Tamen, pro simpla scivolemeco, mi jam estis aĉetinta kelkajn librojn en Esperanto, inkluzive unu de Zamenhof mem. Tamen ili dormis ne tuŝitaj en mia biblioteko. Hodiaŭ mi konsideras ilin trezoro. La interbabilado kiun mi havis okaze kun fraŭlino Maria do Socorro Monteiro, eksprezidantino de la Grupo Esperantista "Ismael Braga" de Garanhuns, vekis en mi vivan entuziasmon pri la lingvo internacia. Malgraŭ ke mi konis apenaŭ kvin idiomojn, ĉiam mi havis deziron koni novajn lingvojn. Mi provizis min je gramatiko, kaj restis mirplena, kiam post kvinhora lernado, mi provis skribi leteron en Esperanto. Kaj mirplena mi restis, kiam la adresato sciigis min ke ĝi estas sen eraroj."

Bedaŭrinde, iom post iom la agado por Esperanto ĉesis ĉe romkatolika medio, en Brazilo.

En letero de la 9-a de oktobro 1976, Wilson Veado, esperantisto el Minas Gerais, skribis al Nelson Pereira de Souza la jenajn vortojn: "**Jam fluis la tempo kiam la katolikoj kaj protestantoj tiom laboradis por Esperanto. La Ligo mem estis speco de sidejo de katolika por-Esperanta laboro.**"

Kvankam spiritisto, Ismael Gomes Braga instigis katolikojn lerni Esperanton. Por atingi tiu celon li skribis leterojn, artikolojn, donacis librojn kaj konatiĝis kun katolikaj sacerdotoj. Imitinda estas tiu ekzemplo de Ismael.



OPINIO

JOSIAS PEDREIRA fariĝis fervora adepto de Spiritismo. Li ofte ĉeestis en spiritismaj eventoj. Konferencoj. Kongresoj, Interfratiĝoj. Tamen li havis fortan inklinon al malutilaj vortbataloj.

liaj detaloj estis sufiĉaj motivoj por malfekundaj diskutoj.

Kunuloj klopodis korekti lian konduton. Ezequiel, la plej sperta, sincere parolis al li:

— Josias, malkonvenaj diskutadoj estas antipatiaj kaj malagrablaj. Spiritismo estas Revivigita Evangelio kaj fundamentas sin sur Karitato kaj natura saĝo. Ĝi ne akordiĝas kun pikparoloj.

La junulo tamen sammomente respondis:

— Nenia ideo disvastiĝas sen diskutoj kaj skuoj. Mi rigardas min mesaĝisto de skuado.

La pliaĝa amiko tolere konsideris:

— Interŝanĝoj de ideoj estas interesaj por klarigi doktrinajn temojn. Tamen kapricemaj diskutoj kondukas al malharmonio.

Josias tamen estis netuŝebla por argumentado. Li plue konfliktis en kunsidoj, ĝis li aŭdis faman preleganton. Altnivela prelego. Tutplena loko. Atenta publiko. Vizitantoj el la ĉirkaŭaĵoj.

Preskaŭ en la fino de la prelego, Josias interrompis la preleganton kaj tenadis jenan dialogon:

— Kion vi opinias pri la reenkarniĝoj de spiritoj en la korpoj de aliaj estaĵoj de la Naturo?

— Tio ne okazas. La Spiritisma Doktrino estas klara rilate al tiu neebleco.

— Se ĝi estus ebla, kiun opinion vi havus?

— Ĝi ne estus ebla. Oni ne dubas pri tio.

Indiferenta antaŭ la ĉirkaŭa murmurado, Josias insistis pri la demando:

— Sed, se ĝi estus ebla...

Li ne finis la frazon. La bruetado ŝanĝiĝis al alta protesto. La preleganto petis serenecon kaj firme diris:

— Se tio estos estus ebla, mi havus opinion.

Ĝenerala surprizo. Plena silento. Post kelkaj atendaj momentoj, la preleganto reprenis la parolon kaj trankvile asertis:

— Se tio estus ebla mi opinius ke vi estas Moskito.

Spirito: Hilário Silva

Mediumo: Antonio Baduy Filho

Libro "Contos e Crônicas", vol I Instituto de Difusão Espírita Editora – Araras SP)

Tradukis el la portugala: João Ângelo Marrara

Jam estas tempo por aliĝi aŭ realiĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo la ano ricevos nian jarlibron, **ALMANAKO LORENZ**, la trimonatan bultenon **KOMUNIKOJ** kaj ankaŭ rajtas elekti du librojn el nia katalogo, kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon: editora_lorenz@uol.com.br (21) 98427-8080

SENPAĜAJ LIBROJ!

Karaj eksterbrazilaj gelegantoj de **KOMUNIKOJ** en la tuta mondo! Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron, **ALMANAKO LORENZ**, tute senpage, per la pdf-a aŭ papera versioj, sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso. Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br



“TENU ŜALTITA ANTAŬ VI LA LUMON DE LA KARITATO KAJ DE LA PARDONO”



“...faru, ke ĝi aspergu karesojn sur vian proksimulon. Tiam vi vidos, ke la Printempo eterne regnos en via Animo – Printempo de Lumo, kiu daŭros en vi kiel ia beno de Dio!”

KARITATO KAJ PARDONO, BENOJ DE DIO KAJ LUMOJ DE LA HOMOJ



KARITATO, MIAJ GEFRATOJ, estas la plej parfuma floro, kiu ekzistas en la Universo. Ĝi estas la floro, kiu ornamas tiun, kiu portas ĝin en si, kaj kiu ebrigas tiun, kiu sentas ĝian parfumon.

Ĉie ajn ni povos planti ĝin, ĉar ĉie ajn ĝi ekĝermos, parfumos kaj senfoliigos sur ĉian ĉagrenitan koron.

Karitato estas la plej delikata floro ekzistanta en la Ĉiela Ĝardeno, ĉar Karitato estas Jesuo, la Preferata de Dio.

Se vi volas vivi feliĉa, lernu ami, ĉar la Amo estas la patro de ĉiuj Virtoj. Kiu amas, tiu sentas en sia Spirito la parfuman elspiron de Dio, ĉar la tuta Dio estas Amo.



La Pardonon donita al povra Pekinto similas la roson, kiu refreŝigas ian floron.

La lipa Pardonon estas folio forportata de la vento, sed la kora, tiu puriganta Pardonon, estas simila al la Jordanaj akvoj.

Miaj amikoj, vi kutimas diri: “Kvankam mi amas, mi tamen ricevas nur maldankemon; se mi disdonas la Bonon, mi ricevas nur malbonaĵojn; se mi disvastigas la lumon, mi renkontas nur tiujn, kiuj volas ĵeti min en la tenebrojn de la dubo.”

Ne diru tion, miaj amikoj!

Kiu amas, tiu jam estas la preferato de Dio, kaj pli malfrue li estos la preferato de la homoj, ĉar iam ili rekonos, ke la Amoparteto, kiun vi donis al ili, taŭgis por malfermi en iliaj koroj ian breĉeton, tra kiu eniras la amo de Dio.



Se vi dissemas la Bonon, vi estas la elektitaj de la Sinjoro. Kion plu vi volas ricevi?

Kiu disverŝas la miraklan akvon de la Bono tra la vasta vivodezerto, tiu iam vidos tiun dezerton transformita en vastegan ĝardenon plenan de floroj, tio estas la frukto de lia penado kaj de lia bonvolemo.

Kiu disverŝas la lumon, tiu ricevas de Dio ian torĉon. Kiu ĝin posedas, tiu ĉiam klopodu, ke ĝi neniam estingiĝu kaj ke ĝi prilumu tiujn, kiuj troviĝas en la mallumo, kaj klarigu tiujn, kiuj troviĝas en dubo.

Klopodu, ke la vento de la malkonkordo ne estingu tian dian lumon, ĉar tiu vento estas tre forta.

Zorgu, ke vi gardu vin en la Templo de la Fido je Dio, por ke tiu vento ne atingu vin; kaj tiam vi povos, el la supro de tiu Templo, prilumi, kvazaŭ ia lumturo, ĉiujn homojn, kaj konduki al la savohavento ĉiujn velŝipojn veturantaj tra la ŝtorma vivomaro.

Estu Bonfarema, disvastigu la Lumon, la Amon, kaj tiam vi ricevos sur vi la Benon de Dio.

Decembro, 1938.

El la libro *Fekundaj Semoj*.

Spirito: Icléia.

Mediumo: Brunilde do Espírito Santo.

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

KELKAJ PENSOJ PRI REENKARNIĜO

Trevor Steele



MALGRAŬ TIO, ke la "ortodoksaj" formoj de kristanismo, islamo, kaj judismo ne akceptas la koncepton de reenkarniĝo, kelkaj opinisondoj raportis, ke almenaŭ en "okcidentaj" landoj iom granda procentaĵo de la homoj aŭ akceptas aŭ ne kontraŭas la ideon.

Kiam mi unue ekkredis je reenkarniĝo (post vizito al Brazilo), tio vere gravis por mi. Subite mi perdis timon de morto kaj trovis la ideon tre riĉiga. Hodiaŭ, mi konfesas, mi malofte eĉ pensas pri ĝi: mi koncentriĝas pri la nuna vivo kaj kutime lasas flanke imagojn pri pasintaj kaj ontaj vivoj. Sed ja de tempo al tempo mia menso ludas kun ideoj pri aliaj vivoj.

Estas multe da intereso nuntempe pri onies biologiaj prauloj. Popularaj televidaj elsendoj esploras la familiajn arbojn de famaj kaj malpli famaj homoj. En mia kazo tiu intereso estas ne granda. Mi multe preferus esplori pri la homoj, kiuj iam estis mi. La homa historio ĉiam tre interesis min, kaj ĉu ne estus fascine subite sperti iun pasintan epokon sur la propra haŭto?

Se ĉiuj homoj konscius pri pasintaj kaj eventuale estontaj vivoj, tio devus multon kontribui al pli saĝa konduto. Se ni akceptus, ke X kondukas tiel pro eventoj el antaŭa vivo, sendube ni pli komprenus kaj estus pli toleremaj. Fanatikeco religia aŭ nacia aŭ triba montriĝus stulta: se iu malamas la homojn de religio Y kaj nacio Z, tiu homo memoru, ke tre eblas, ke "la venontan fojon" li aŭ ŝi naskiĝus Y-religiano aŭ Z-naciano.

Lasta rimarko: mi ĵus ricevis libron kun la titolo "Reincarnation". Mi volonte legus ankoraŭfoje pri pruvoj/indikoj pri la realeco de reenkarniĝo. Sed la aŭtoro de la libro simple citis serion da homoj/religioj, kiuj kredis je pluraj vivoj. Nenia nova informo. Mi ne legis pli ol duonon de la libro.

Ĉu tio montras nur, ke mi estas tro influata de moderna skeptikeco kaj bezonas "faktojn"? Eble, sed la libro pensigis min pri la argumento, ke kristanismo estas la vera religio, ĉar la Biblio diras, ke ĝi estas la vera religio.

PLANITA ABORTIGO

M. Monken

ESCEPTE DE MALOFTAJ SITUACIOJ, planita abortigo estas kovarda, intenca mortigo de filo ankoraŭ vivanta en la patrina ventro. Ĝi estas abomenindega krimo farita kontraŭ viktimo senkulpa kaj sendefenda.

Tiu, kiu ĝin apogas aŭ instigas estas kunkulpulo kaj same respondecas pri ĝia realigo.

Informo al la feministinoj: La "embria korpo" ververe ne estas "la virina korpo".

Ĉu iu dubas? Atendu naŭ monatojn kaj vi konsciiĝos pri tio.

Laŭ Joanna de Āngelis (pere de medio Divaldo Pereira Franco): "La vivo estas "heredaĵo de Dio" kaj ia ajn krimo, farita kontraŭ ĝi, pro ia ajn motivo... neniam meritas leĝigon".

Al virinoj estas disponigataj jenaj metodoj kontraŭ gravediĝo, eĉ kelkaj liveritaj de la registara sanservo: perbuŝa kaj transhaŭta kontraŭkonceptiloj, envagina ringo, injektiloj monataj kaj trimonataj, la subderma hormonoplanto, la kirurgia ligaturo de la uteraj tuboj, la enutera aparato (DIU), la "posttaga" pilolo, la virina kaj vira kondomoj, interrompitaj seksrilatoj kaj listo de fekundigeblaj tagoj por eviti sekskuniĝon, la fama "tabelo". Ĉi tiuj du lastaj malpli efikaj.

Nuntempe patriniĝas nur virino kiu deziras kaj kiam ŝi volas tion. Se okazas la nomata "neplanita gravediĝo" la Universaj Leĝoj, superregantaj la vivon, kunvokas nin al respondeco.

Estulojn ribelemajn kontraŭ la Leĝo de Amo trafos, en baldaŭa estonto kaj eĉ dum estontaj surteraj enkarniĝoj, spiritaj obsedoj, pluraj tipoj de psikiatria afekcioj aŭ fizikaj domaĝoj kampe de la gravedkapablo. Laŭ la leĝo de Kaŭzo kaj Efiko oni ne povas semi kaktajn kaj rikolti rozojn.

La deveno de ĉi tiuj bedaŭrindaj krimoj estas la plena ignorado de homo pri si mem. La virino ne atentis pri sia propra senmorteco kaj vojaĝado tra la padoj de la eterneco. El tio rezultas sufero... de ni mem forĝita.

Se vi iam tiele misagis, ne faru al vi tro da zorgo. Ĉu restis kulposentoj? Forĵetu ilin malproksimen! La Superrega Favorkoreco Senlima jam pardonis vin. Necesas nur ke vi mem pardonu vin, iru antaŭen kaj refaru ĝuste la vojplanojn de via vivo. La Dia librotenado permesas al ni erari tuje kaj kviti niajn ŝuldojn per moderaj partopagoj tra liberigaj reenkarniĝoj. Vi estas radianta lumfadeno el la Kosma Fonto, kredo tion, via esenco estas dieca, vi ekzistas ene de la ekzisto de Dio.

"La Amo kovras multegon da pekoj" (Sankta Biblio – 1 Petro 4:8)

Tiam, per ampleksigo de nia konscienco, ni efektivigu interne de nia koro la ĉeeston de la Senkondiĉa Amo.

Restu paco, via destino estas la feliĉo en la Luma Regno.



EL NIA E-LITERATURO

EL “LA ĜOJA PODIO”

Raymond Schwartz
(1894 – 1973)

POR PAROLI NECESAS malfermi la buŝon. Sed kiam oni malfermas la buŝon, ne estas ĉiam por ion diri. Oni povas malfermi la buŝon por manĝi, aŭ trinki, aŭ spiri plenpulme, aŭ por oscedi, aŭ esprimi miron, aŭ tute simple por... malfermi la buŝon, kiel, ekzemple, ĉe la dentisto, kiam oni sidas sur la komforta torturŝego. Tiurilate, ĉu mi rajtas rimarkigi, ke la dentistoj ĝenerale estas malbonaj pedagogoj? Por komenci ili diras al vi: “Malfermu la buŝon!” kaj tiam ili tuj ŝovas inter viajn vangojn tutan aron da fremdaj aĵoj: valon, paperon, kauĉukon, pinĉilojn, ŝraŭbojn, tenilojn kaj nun, kiam via buŝo estas ĝiseksplode plena kiel militpreta arsenalo, nun li naive demandas: “En kiu dento vi sentas doloron?...” al kio vi povas respondi nur per onomatopcaj gargarsonoj.

Simile nekomprenemaj estas la hartondistoj. Ĉiufoje, kiam mi sidas sub la blanka tolaĵo, kvazaŭ oficanta pastro dum la vesproj, la deĵoranta artisto gentile forprenas miajn okulvitrojn, pretekstante, ke ili ĝenos liajn manovrojn, kaj tuj poste li enmanigas al mi amason da gazetoj, kiujn kompreneble mi ne povas legi pro manko de miaj okulvitroj. Vidante, ke mi ne deziras legi, li pensas, ke mi emas konversacii kaj tuj li komencas: “Vi ne plu havas multe da haroj,



sinjoro!...” Tio, evidente, signifas paroli por nenion diri - ĉar mi ne bezonis ateston de specialisto por scii, kion mi scias.

Kaj tio estas la katastrofo de la mondo, ke la homoj parolas ju pli, des malpli ili havas por diri kaj kiam ili havas multon por diri, ili silentas!

Vidu, kiam vi akompanas karan amikon al la stacidomo, de kie forportos lin por multaj jaroj la senkora vagonaro, vi

sentas, ke postrestas nur mallongaj momentoj kaj vi havas ankoraŭ tiom da aferoj, kiujn vi nepre volus preparoli. Neniam sufiĉos la kelkaj minutoj kaj... vi silentas, aŭ, kiam fine vi tamen ekparolas, estas por demandi: “Ĉu vi estas certa, ke vi ne forgesis vian poŝtukon?”

Vidu la geamantojn! Jen hometoj, kiuj dezirus detale priskribi sian feliĉon, eldiri en historiaj vortoj sian amon, sian ĝojon, sian admiron, sian Dio-scias-kion, kaj... ili silentas. Estas vere, ke ili staras sur la sojlo de gravaj decidoj. “Ĉu jes? Ĉu ne?” Kaj saĝe konsilas la proverbo, ke antaŭ ol diri definitivan stultaĵon, oni devas turni almenaŭ sepfoje la langon en la buŝo. Kaj tio ŝajne estas la sola konsilo, kiun la geamantoj konsentas obei. Tial, antaŭ ol interŝanĝi poreternajn ĵurpromesojn, tre konsciencie, kaj pli ol sepfoje, ili turnas la langon en la buŝo... unu de la alia.

El Trezoro

La Esperanta Novelarto – unua volumo
Hungara Esperanto Asocio



AMA ELAĈETO

DANK'AL DIO
Li ilin aĉetis, li do preferis ilin alparoli, eĉ rigardante ilin nuraj varoj kaj investoj...

“– Submetiĝu al mi, via mastro, kiu vin aĉetis por al vi certigi vivon de honora laboro en la kampoj de mia bieno. Mi aĉetis vin altpreze, sciante, ke viaj brakoj estos al ni altvaloraj. Laboru kun energio kaj vi havos longan vivon en miaj propraĵoj, kaj krome ankaŭ povos pariĝi kaj naski idojn profite al la bieno kaj al ni ĉiuj.”

Kaj la intendanto peladis la tutan negraron. La infanoj iris en bovĉaroj dum junuloj kaj plenkreskuloj piediris, sur longa vojo, de la urbo ĝis la prospera posedaĵo de la mastro.

Inter tiuj uloj nudbrustaj, nudpiedaj kaj kunkatenitaj, tristmienaj kaj senkonsolaj, troviĝis knabineto tute simila al ĉiuj aliaj. Kun mallevitaj okuloj, haŭto difektita kaj intense nigra, haroj taŭzigitaj, krude kaj kurte tonditaj por eviti infeston de pedikoj, ŝi iris kune kun la novaj sklavoj akiritaj de la bieno, kiu de nun estos ŝia loĝejo kaj malvasta universo.

La mastro, kontenta, kun manoj sur la koksoj, vidas ilin alvenantaj al lia propraĵo kaj diskondukataj al la lokoj por ili destinitaj.

Li ŝatus ilin alparoli, celante fari al ili bonan impreson kaj estigi ian senton de espero en tiuj spiritoj sensciaj kaj facile manipuleblaj, fari ilin regeblaj kaj facile adapteblaj al kamlabora vivo.

Multaj devus servadi ĉe plantkulturado, aliaj, preskaŭ ĉiuj, ĉe plugado, kaj iuj malmultaj ĉe la mastrodomo. Ĉi lastaj devus esti trejnataj por bonmaniera konduto kaj purigado, krom ankaŭ kuirejaj servoj kaj helpo al la familiaj virinoj.

La negrinetoj bontonaj kaj kun malpli krudaj manieroj povus servadi en la domo, sed ankoraŭ kun zorga rezervo kaj komenca tre rigora viglado.

La kontenta mastro demetis la ĉapelon, kiu estis simbolo de lia povo pro ties tipa eleganteco kaj speciala deveno eŭropa, kaj igis la portanton havi ŝajnan aspekton de senriproĉa aŭtoritatulo.

Li preterpasis la fenestrojn kaj rigardis ilin irantaj al laboro, kun nudaj dorsoj rebrilantaj sub la suno.

Iom post iom la bieno, pro la nova sklavaro adaptiĝanta al laborado, revenis al normaleco kaj lokis ĉiun en ties funkcion.

La knabino en la komenco estis sendita al plugado. Ŝi preparis pli molan teron kaj ellaboris la legomĝardenon, kiu produktos vegetaĵojn necesajn al la doma kuirejo.

Ĉiutage, post prilaboro de tiu eta parto de la tereno, ŝi portis surkape, en la kuirejon, kion ŝi rikoltis por preparo de la manĝo de gemastroj kaj infanoj.

Dum ŝi zorgis pri kultivo de nutraj plantoj, ŝi profitis la tempon por semadi plantojn medicinajn, kiujn ŝi jam konis per la patrino dum la nelonga tempo, en kiu ili kune vivis. Ŝi tiel produktis unĝentojn, infuzaĵojn kaj medikamentojn el la brazila flaŭro, per kio ŝi obtenis rebonfartigon kaj malpligravigon de la malsanoj de siaj kunuloj en misfortuno.

Kaj pasas la tempo, rapida kiel la penso.

La jaroj sin sekvas kaj ŝi pasas de la legomĝardeno al la kuirejo, komence por purigaj taskoj kaj poste por preparo de nutraĵoj. Kaj la manĝo, post ŝia konvena lernado, eliradis fumanta, bonodora kaj ĉiam bongusta.

La tempo ĉiam ankoraŭ pasis kaj ŝiaj manoj malfortiĝis, fariĝis tremaj. Ŝia dorso kurbiĝis kaj ŝia parolo hezitemis. Ŝiaj konsiloj ankoraŭ estis tre respektataj de la pli junaj negretoj, forte ekscitataj de vigla ribelemo.

Por la mastro, ankoraŭ imponaspekta, ankaŭ pasis la tempo.

De proprietulo, li fariĝis mastro, poste kolonelo, sekve politikisto, kaj fine riĉulo.

Maloŭte la mastro eniris la kuirejon, pro kio li maloŭte ŝin vidis. Kiam li renkontis tiun sensignifan sklavon, ja sian proprietaĵon, li eksentis frostotremon. Li komence ne donis atenton al tio, kion li supozis aerblovo. Poste, interligante faktojn kaj perceptante, ke ĉi sento rilatas al tiu “kadukulino”,

→



li zorge ŝin evitadis sed havis saman zorgon, ke ŝin ne trafu nenecesajn embarasojn, ĉar ŝia ĉeesto lin timigis.

Kaj ankoraŭ plu pasis la tempo.

Tempo senkompata, kiu ekestis neelportebla por la fizika korpo de ambaŭ.

En iu vintra nokto, post ol senti fortajn Brustdolorojn kaj konstantan spirmankon, ŝi mortas. Ĉe mateniĝo oni trovas ŝian rigidiĝintan korpon envolvita en ŝiaj ĉifonaĵoj.

Kun la koro malpezigita pro la forpaso de tiu negrino, kiun li opiniis sorĉpova pro la dolĉeco, kun kiu ŝi ĉiam lin rigardis, li faris disponon por ŝin enterigi malproksime, ene de arbaro, kie la nigra tombejo situas, ĝuste en la mezo de monteto.

Kelke da jaroj poste, ĉirkaŭita de familianoj, amikoj kaj flatantoj de riĉuloj, kiuj tute ne mankas ĉe prosperuloj, li elkarniĝas, envolvita en littukoj el pura linaĵo, post konfeso al parokestro kaj ricevo de lasta ŝmiro.

En la vera vivo, droninta en nebulego, li vagadas serĉe de iu, kiu lin orientus.

Malpurega, treege laca, kun piedoj sangantaj pro troa marŝado, li fine ekvidas, post multtaga irado kaj serĉado,

iun, kiu lin atendas. Li proksimiĝas al la dometo, de kie eliĝas agrabla aromo de simpla terpoma supo. Timoplena kaj hezitema, en la espero pri homa kontakto kaj helpo, li ekrimarkas ies rideton kaj voĉon dirantan al li:

“Estu bonvena, proksimiĝu, se vi deziras. Ĉu vi malsatas? Venu, palpu la ŝtonojn kaj fariĝu al vi oportune, ĉar mi vin priservos.”

Kaj li, preskaŭ blinda, surgenue, profunde kortuŝita, dankas tiun bonfaran anĝelon, kiu savis al li la “vivon”, al li servante tiel bongustan manĝaĵon.

Li ekvidas tiel fortan lumon, ke li supozas stari antaŭ li Nia Sinjorino.

Li kliniĝas kun la intenco karesi al ŝi la piedojn kaj ekvidas, puraj kaj diaj, la nigrajn piedojn de sia malnova proprietaĵo.

Humilo kaj servado ĉiam, al iu ajn.

Dank'al Dio.

Spirito: Antonio Francisco

El la portugala tradukis: Affonso Soares

Kunlaboris: João Marrara

Ni revenas!



RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA VALO



Lorena - SP
Adreso: "Clube
Comercial de Lorena"
Av. Marechal Teixeira
Lott, 95-259

Je la 2a de aprilo 2023
de la 9a ĝis la 16a horo

Prelegetoj, diskutoj, simpla babilado,
brakumado...

Ni kunsidos en agrabla, amika etoso!

kontakto: psviana@terra.com.br

**Ĉeesta
Evento**

**Ĉu transtomba
BABELO?**
Kiel komunikas la spiritoj?

13a Brazila Renkontiĝo de Esperanto-Spiritistoj
22 – 23 de aprilo 2023 | Uberlândia-MG

Aliĝoj ĉe www.baes.org.br



BAES
Brazilia Asocio de Esperanto-Spiritistoj

www.baes.org.br
kontakto@baes.org.br
+55 34 997748785



FAMILIO

INTER LA HOMOJ, la samsanga familio povas esti komprenata kiel la esenca centro de niaj reflektaj: agrablaj aŭ malagrablaj reflektaj, kiujn la pasinteco resendas al ni.

Memkompreneble ni al ĉi tio ne alkalkulas la ĉampionojn de la evoluado, kiuj, kondukite en la ordinaran medion, ĝin tuj superas, kreante mensan etoson al si esence propran kaj plenumante la renovigan programon kies portantoj ili estas.

Ni do pritraktas nian pozicion sur la ordinara batal-kampo.

Ĉiu kreito estas provizore alkonformigita al la limoj de la agado, kiun li kapablas plenumi, aŭ, pli klare, ĉiu el ni nur iom post iom transpasos la horizonton, kiun li jam atingis per siaj propraj reflektaj.

La primitivulo ne foriĝas senprezare de sia naskiĝejo, sed tie ja multfoje renaskiĝas, kaj la relative civilizita homo longe restadas ĉe la rasa medio, en kiu li asimilas la necesajn spertojn tiel longe ĝis la tutaĵo de liaj akiroj rekomendos lin por novspecaj realigoj.

Jen kial, ĉe la sfero de la samsangeco, la enkarniĝinta Spirito iras renkonte al la korligoj, kiujn li mem teksis al si, konforme al tiu mensa linio karakterizanta liajn tendencojn.

Pro tio, la tiel nomata psikologia heredeco estas iasence la natura kunigo de spiritoj inter si afinantaj pro altiriĝemo al samaj aktivecoj kaj inklinoj.

Granda artisto aŭ eminenta heroo povas naskiĝi en sfero fremda al la sentoj, per kiuj ili elstaras. Tio estas la manifestiĝo de la genio, paciencie ellaboriĝinta en la kuro de la jarmiloj kaj transsendanta la reflektajn de sia individueco per giganta konstrulaboro.

Sed, sur la ordinaraj reloj, en la hejma templo kolektiĝas tiuj, sin respegulantaj, unuj en la aliaj.

Familio el muzikistoj pli facile akceptos en sian idaron praktikantojn de la dia arto, ĉar ofte la Spiritoj okupantaj ĉe ili, per la reenkarigiĝo, la pozicion de filoj, estas tiuj samaj amikoj, kiuj, ankoraŭ en la spirita regiono, jam stimulis

ilian muzikan kleriĝon, kaj ĉiuj sin reciproke respegulas en la kontinua aktiveco, al kiu ili sin donas tra multenombraj jarcentoj.

Samkiale skulptistoj kaj poetoj, politikistoj kaj kuracistoj, komercistoj kaj terkulturistoj preskaŭ ĉiam donas al si la manojn, unuj al aliaj, ĉe la kulto al la plej bonaj korligaj valoroj, sin reciproke kontinuigante en la familia genotipo kaj antaŭgardante por si mem, per la komuna laborado kaj laŭ la leĝo de renaskiĝo, la evoluon heredon proprajn, per kiu ili sin esprimas en la spaco kaj en la tempo.

Ankaŭ tial, laŭ la sama principo de altiriĝemo, ni vidas dipsomaniulojn kaj kleptomaniulojn, krimulojn kaj promoralajn malsanulojn naskiĝi de tiuj, kiuj al ili spirite agordiĝas per samaj difektoj kaj elprovoj, ĉar multaj malviriĝintaj inteligentaj alkonformiĝas al la genetika kampo de tiuj, altirantaj ilian kunecon, pro la malnoblaj sentoj aŭ bedaŭrindaj faroj, per kiuj ili ŝuldiĝis kontraŭ la Leĝo.

La familia morala difekto do rezultas el ŝuldo-kunigo kaj nin lokas en la genetika sfero, kiun ni meritas laŭ niaj ŝuldiĝoj kontraŭ la mondo kaj la vivo. Tiakaŭze ni estas devigitaj sperti la refrapon de niaj toksaj reflektaj tra iuj anoj de nia parenkaro, kiuj al ni resendas tiujn reflektajn pere de afliktaj procesoj de suferado.

Ni do renkontas en la hejma grupo ne nur tiujn ligilojn el nobleco kaj ĝojo, kiujn ni jam sukcesis teksti per amo laŭinde praktikata, sed ankaŭ la katenojn el honto kaj antipatio, per kiuj ni rikoltas la maltrankviligajn kliŝojn, kiujn ni mem stampis sur la memoro de l' destino kaj kiujn ni bezonas estingi per laboro kaj sinofero, pacienco kaj humileco, nome novaj rimedoj, per kiuj ni estigos novajn spiritajn reflektajn povantajn nuligi la efikojn de nia pasinta, tumulta kaj malfeliĉa konduto.

Libro: Penso kaj vivo

Spirito: Emmanuel

Mediumo: Francisco Cândido Xavier

El la portugala esperantigis: Affonso Soares